



Pos-Amiko

Somero 2022, numero 41

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Baldaŭ la unua opero en Esperanto
1. Kiu prenos la lokon de Roterdamo?
2. NEJ iĝas transport-kompanio
3. Kara Koko
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopoj
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

Baldaŭ la unua opero en Esperanto

Post la baldaŭ prezentota muzikalo en kaj pri IJK la maljunulara movado preparas sian respondon: originala opero en Esperanto pri la Universala Kongreso. La rakonto koncentriĝos pri la plej tipaj spertoj dum monda kongreso: la solena malfermo, la komitatkunsido, kaj la solena fermo.

Ĉar tio estas granda kaj unika tasko, la estraro de UEA prezentos en Montrealo kvinjaran planon por ĝia realigo: en 2023 estos verkita la subvencipeto, en 2024 la skripto estu verkita, en 2025 okazu elektado kaj trejnado de operistoj, kaj en 2026 kaj 2027 okazu kvar fizikaj kunvenoj por ekzerci la spektaklon, kiu prezentiĝu dum la 112-a Universala Kongreso de Esperanto.

Kiu plenumos la lokon de Roterdamo?

Kun la fina jaro de la Pos-Amiko, eldonata en Nederlando, kaj la baldaŭa vendo de la granda Centra Oficejo, la movado perdas sian simbolan ĉefurbon. Kvankam la sidejo de UEA nek TEJO ŝanĝiĝos, la multe malpli granda spaco en la nova oficejeto malebligas okazigon de malfermaj tagoj, pompaj kunsidoj aŭ rito-plenaj kafopaŭzoj. Kelkaj aliaj urboj jam pretiĝas por preni la simbolan bastonon.

Unue en la vico estas certe E@I en Slovakujo, kiu jam sukcesis akiri de UEA la kongresan fakon, kaj ekde la kreo de la interreto

pli kapablas uzi ĝin ol aliaj organizoj. Malhelpe povas esti la ĵusa translokiĝo de la oficejo de Partizanské al malpli elparolebla urbeto, kiu daŭre restas for de rapidaj internaciaj vojaĝkonektoj.

Proksime al ĝi, ĉu subtene, ĉu konkurse, troviĝas alia esperplena centro de la movado: Prago. En tiu ĉi urbo loĝas multaj junaj aktivuloj, plejparte ne naskiĝintaj tie; unu loĝejo eĉ enhavas tri komitatanojn de TEJO. Ankaŭ la maljunulara movado tradicie fortas en Prago. Ĉu la TEJO-estrarkunsido en la urbo estis fakte la simbola transdono de krono?

Tria kandidato tamen troviĝas, en la konata franca urbo Tuluzo. Tie granda volontula armeo nomata EKC disvastigas influon, kaj regule sendas volontulojn aŭ estraranojn al Roterdamo. Ankaŭ ĝi altiris multajn TEJO-estraranojn (por denove iu trejnado) kaj krome proksimas al la hejmo de verda muziko, la studio de Vinilkosmo.

Tamen ĝis nun en neniu loko naskiĝis vera posteulo por la vaste laŭdata Pos-Amiko; la konata novaĵbloga Libera Folio estas ja nur satira. Ĉu sen tia komunikilo vere eblas regi la movadon?

NEJ iĝas transportkompanio

Estas konata fakto, ke ĉiu esperantisto ŝatas trajnojn kaj aliajn publikajn transportilojn. Esperantistoj ofte vojaĝas kune al kongresoj en tiel nomataj 'karavanoj', dume timigante la ekstermovadajn kunvojaĝantojn.



Tiu ĉi ne estas la IJK-buso, sed indis havi iun bildon.

Sed la nederlanda IJK reprezentas la sekvan paŝon en la transportŝato de la esperantistaro: propra IJK-buso portos partoprenantojn de trajnstacio rekte al la kongresejo, en ĉiuj horoj de la tago. Signifa parto de la IJK-buĝeto, de la tempo de la organizantoj, kaj de la komunikado al partoprenantoj estas dediĉita al tiu ĉi servo. Ĉu post la IJK tio ĉi iĝos la ĉefa okupo de la Nederlanda Esperanto-Junularo?

La prezidanto de NEJ, Spencer van der Meulen, ne estis havebla por komentoj.

Kara koko...

“Kial la listo de aliĝintoj kaj la organizantoj de IJK estas sen familiaj nomoj? Kaj kial la kongreso okazas en la mezo de nenio?”

Kara homo,

Famo estas beno kaj malbeno. Iuj homoj floras en la gloro de adoro, kaj aliaj velkas en kakofonio de pli ol kelkaj. Ĉu serĉi famon kreante elstaran klaĝgazeton, ĉu vivi sennome kaj senĝene? Tiun elekton ni preferas lasi al la aliĝintoj mem. Kaj la organizantoj ĉiuokaze famas eĉ ununome.

Kaj pri la dua demando: se la IJK estus en la mezo de ĉio, kie estus spaco por nia kongreso, por niaj koncertoj, niaj kunsidoj kaj nia propra plaĝo? Ĉu vi iam provis konstrui plaĝon en la centro de granda urbo? Tuta koŝmaro. Ne, nia kongreso okazas tie, kie ĝi okazas, ĉar tie estas spaco.

Poso

NEJ- Novajoj!

Nederlandano venkas flandran konkurson

En februaro FEL, la Flandra Esperanto-Ligo, lanĉis konkurson por senpaga partopreno en IJK por flandraj junuloj. En la fino evidentiĝis, ke la plej taŭga flandra junulo estas nederlandano, Chard. NEJ gratulas al li pro tiu ĉi speciala atingo kaj bonvenigas lin al la IJK.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Vi renkontos interesan fremdulon kun ukulelo kaj naŭ-eŭra trajnbileto.

Taŭro: Vi havas ankoraŭ sufiĉan tempon por iĝi opera kantisto ĝis la UK-opero.

Ĝemeloj: Vi gajnos la loterion. Sed ĉu aĉeti la Centran Oficejon, aŭ milionon da IJK-bieroj?

Kankro: Vi malkovros, ke pli ĝuigas IJK-ekskurso ol lerneja kurso.

Leono: Se viaj familianoj ne aliĝas al IJK, verŝajne indas trovi novan familion.

Virgulino: Post varmega somero vi ne plu estos.

Pesilo: Vi pretiĝas por la muzikalo kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Pro administra eraro via ĉi-jara impostpago estos unu reno.

Albert: TEJO trejnas la trejnistojn, sed kiu gardos la gardistojn?

Sagitario: Se iu demandas vin, kial vi lernis Esperanton: la Pos-Amiko.

Kaprikorno: Kun la taŭga sinteno ĉio povas esti ekskurso.

Akvisto: Por iri al IJK per naĝa karavano, vi unue bezonos fosi longan kanalon.

Fiŝoj: Se vi havas nenion pli bonan por fari, kial ne inviti IJK-n al via hejmo?

Kion vi kunportos al la IJK?

Iom pli ol monato restas ĝis la pinto de via vivo. Zorgu, ke vi estu perfekte preparita por ĝi.



IJK 2022 NEDERLANDO

De Roerdomp - Westelbeers

Unue kontrolu, ĉu vi bone prepariĝis antaŭ la kongreso:

- Ĉu vi jam aliĝis? Kontrolu tuj en <https://ijk2022.tejo.org/listo-de-aligintoj/>
- Ĉu vi jam pagis? Legu la retroŝtmesaĝon 'Gravaj IJK-novaĵoj'
- Ĉu vi planis vojaĝon kaj aliĝis por karavanoj? <https://ijk2022.tejo.org/alvenebloj/>
- Ĉu vi elektis ekskursojn kaj aliĝis? <https://ijk2022.tejo.org/ekskursoj/>
- Ĉu vi legis ĉiujn Pos-Amikojn? <http://kkps.esperanto-jongeren.nl/eo:pos-amiko>

Ĉio bona? Tiam estas tempo por fari vian pakliston! Nepre en via valizo estu:

- Steloj, kaj eŭroj por aĉeti pli da steloj.
- Pruvilon pri via kronvirusa vakciniĝo.
- Bongustaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj el via lando por la Kultura Foiro.
- Naĝkostumo, bantuko kaj eble ban-anaso por ĝui la IJK-plaĝon.
- Se vi dormas en tipio, matraco kaj dormsako. Se en tendo, ankaŭ portu tendon.
- Se vi dormas en amasloĝejo, orelŝtopiloj.
- Informiloj pri via hobia projekto, pri kiu la tuta mondo bezonas scii.

20-27 aŭgusto. Ĉu vi pretas?